



PACO



OFICIALA ORGANO DE MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO

VIII-a jaro. N-ro 89

Ĉeĥoslovaka eldono

Aprilo 1961

NI LABORAS KAJ BATALAS POR TUTMONDA PACO



P
O
R

H
O
M
A
R
A

I
N
T
E
R
K
O
M
P
R
E
N
I
Ĝ
O

Pentris aparte por PACO
Nacia artisto

Št. R. Seemann: ĈSSR

HO PACO!

Ho Paco! Plej kara trezoro homara!
Ho Paco! Ĝojegon Vi kaŭzas en kor'
Sen via ekzisto necerta, amara
Fariĝus la vivo, ekregus dolar'.

Ho Paco! Vi faras la vivon valora,
Ho Paco! Vi donas trankvilon al dorm',
Ne estas homara spirado angora,

Ĝis kiam ĝin gardas Vi antaŭ la ŝtrom'.

Ho Paco! Lulilo de 1' homa progreso!
Ho Paco! Lulilo de 1' ĉia ekflor!

Por tempoj venontaj jen nia promeso:
„Ni ĉiuj Vin gardos ĝis lasta la hor'!“

Bratislava, 22. 1. 1961.

ALVOKO AL POPOLOJ EN LA TUTA MONDO

Ni, la reprezentantoj de komunistaj kaj laborulaj partioj el kvin mondpartoj, kunvenintaj en Moskvo je tagoj de 43-a datreveno de la Granda oktobra socialista revolucio, konsciante la respondecon pri sorto de la homaro, ni alvokas vin

al ĝenerala defendado de la paco, al batalo kontraŭ la danĝero de nova mondmilito!

Antaŭ tri jaroj la komunistaj kaj laboristaj partioj turnis sin al nacioj de tuta mondo per la Manifesto de paco.

Depost tiu tempo la pacamaj fortoj atingis gravajn venkojn en luktado kontraŭ la militinstigantoj.

Ankoraŭ kun pli firma fido je pacvenko hodiaŭ ni povas kontraŭstari la militdanĝeron, minacantan al milionoj da viroj, virinoj kaj infanoj. Ĝis nun neniam en homara historio estis tiel reala la esperŝanco je efektiviĝo de ĉiutempa popolsopirado pri vivo en la paco kaj libereco.

Pro la danĝero de militkatastrofo, kiu sekvigus gigantajn viktimojn, pereon de centmilionoj da homoj kaj rubaĵigus ĉefcentrojn de mondcivilizaco, la problemo pri packonservo pli intense ol iam antaŭe maltrankviligas la homaron.

Ni komunistoj luktas pri la paco, ĝenerala sekureco, pri tiaj kondiĉoj, en kiuj la tuta homaro kaj ĉiuj popoloj ĝuados pacan kaj liberan vivon feliĉan.

La celo de ĉiu socialista lando kaj de la tuta socialista komunismo estas sekurigi daŭran pacon por ĉiuj nacioj.

La socialismo ne bezonas militon. Historia luktado inter malnova kaj nova sociordoj, inter ia socialismo kaj kapitalismo, ne estas solvenda per mondmilito, sed en paca konkurado, per konkurado pri tio, kiu sociordo atingos pli altajn nivelojn en la mastrumado, tekniko kaj kulturo, kaj al popolamasoj certigos plej favorajn vivkondiĉojn.

Ni komunistoj konsideras nia sankta devo fari ĉion, kiom estas en niaj fortoj, por savi homaron antaŭ teruregoj de nuntempa milito.

Ĉiuj socialistaj ŝtatoj laŭ instruo de granda Lenin sur la principo de paca kunekzistado de ŝtatoj kun diversa sociordo bazigis sian eksterlandan politikon.

En nia epoko la nacioj kaj ŝtatoj havas nur unu eblecon: aŭ pacajn kunvivadojn kaj konkuradon de socialismo kaj kapitalismo, aŭ murdigan nuklear-militon. Ne ekzistas alia vojo.

Kio endanĝerigas la mondpacon?

Pri la paco parolas ĉiuj registaroj, tamen: decidus ne vortoj, sed la faktoj.

Samkiel en pasinteco ankaŭ hodiaŭ organizas kaj iniciatas agresan militon la reakciulaj monopolistaj kaj militaristaj rondoj de imperiistaj landoj. Paco endanĝerigas la politiko de registaroj de imperiistaj ŝtatoj, kiuj kontraŭ la volo de la popolo al landoj entrudas pereige febran armadon, ekscitas malvarman militon kontraŭ socialistaj landoj kaj aliaj pacamaj ŝtatoj kaj subpremas liberec-aspirojn de la nacioj.

PAROLU LA FAKTOJ!

La nacioj bonvenigis proponon de Sovetunio je ĝenerala, tutplena kaj kontrolata senarmigo, varme subtenatan de ĉiuj socialistaj landoj. Kiu kontraŭstaras la efektivigon de ĉi-propono? La registaroj de imperialistaj ŝtatoj gvidataj de Usono, kiuj anstataŭ kontrolata senarmigo proponas kontrolon super armado kaj strebas la senarmigan traktadon ŝanĝi je senfrukta babilado.

La nacioj ĝojas, ke tri grandpotencoj jam dum du jaroj ne praktikas provojn kun kernarmiloj. Kiu kontraŭstaras entrepreni pluan paŝon al decido pri definitiva malpermeso de ĉi-tiuj mortportantaj provoj? Estas la registaroj de imperiistoj, kiuj senfine proklamas intencon renovigi provojn kun atomarmiloj, kaj senĉese minacas neniigi la traktadon pri la malpermeso, kiun sub premo de la nacioj ili estis devigitaj partopreni.

La nacioj ne volas, ke sur ilia suverena teritorio ekzistu militbazoj; rifuzas agresajn militpaktojn, kiuj limigas sendependecon de iliaj landoj kaj venigas danĝeran situacion.

Kiu kontraŭstaras tion?

Estas la ŝtatregistaroj de Atlantika bloko, kiuj al okcidentgermanaj militaristoj kaj revenĝistoj disponigas militbazojn sur fremdaj teritorioj, enmanigas armilaron de amasneniigado kaj rapidigas atomarmadon de NATO-armearo.

Estas la registar-rondoj de Usono kiuj al Japanujo, Pakistano, kaj aliaj ŝtatoj de Mez- kaj Malproksima oriento entrudis militpaktojn, instigante ilin kontraŭ pacamaj landoj, okupadas Sud-Koreion, ŝanĝinte ĝin je sia militekmarŝejo, renovigas japanan militarismon, sin trudas en internajn aferojn de Laosio kaj Sudvjetnamio, subtenas nederlandajn imperialistojn en okcidenta Irjano, la belgajn en Kongo, portugalojn en Goa samkiel eĉ aliajn koloniistojn, preparas armitaran intervenon kontraŭ Kuba-revolucio kaj al landoj de Latin-Ameriko insistas pri milit-paktoj.

Estas Usono, kiu okupacias la ĉinan insulon Thaj-Van, senĉese en aerspacon de Ĉina popoldemokratia respubliko elsendas siajn militaviadilojn ignorante ĝian legitiman rajton je prezenzo ĉe la Organizado de Unuiĝintaj Nacioj.

La raketoj en paf-preteco, deponejoj plenaj de nuklear-armiloj, aviadiloj en aero manovrantaj kun hidrogen-bomboj, militŝipoj al atako preparitaj kaj submar-ŝipoj sur maroj kaj en oceanoj, reto da militbazoj sur fremdaj teritorioj — tiel aspektas la samtempa konduto imperialisma. Dum tia situacio kiu ajn lando, granda aŭ malgranda, tute neatendite povas esti trafita per incendio de nuklear-milito.

La imperiismo pro egoistaj interesoj de grupeto da grand-monopoloj kaj koloniistoj pelas la mondon al militando.

Malamikoj de la paco disvastigas mensogajn elpensitaĵojn pri imaga „Komunista agreso“, por sekretigi siajn efektivajn celojn, paralizi la volon de nacioj kaj en iliaj okuloj kialigi la vet-armadon. **LABORISTOJ! AGRIKULTURISTOJ! LABORANTA IN-TELIGENTARO! HOMOJ DE BONA VOLO EN TUTA MONDO!**

Nuntempe por la homaro ekzistas neniam pli urĝa demando ol la batalo kontraŭ la danĝero de raket-kaj nuklear-milito, la luktado pri ĝenerala kaj tutplena senarmigo, por konservo de la paco. Ne ekzistas pli nobla devo hodiaŭ ol la partopreno en tiu ĉi batalo.

Ĉu eblas daŭra paco tutmonde?

Ni komunistoj respondas:

Milito ne estas neevitebla, milito povas esti malebligita, la paco defendita kaj firmigita.

Tiu ĉi nia konvinko rezultas ne nur el nia porpaca volo kaj malamo al militinstigantoj. Ebleco malhelpi militon fontas en realaĵoj de la nova mondsituacio.

Deeidiga faktoro en samtempo ĉiam pli multe fariĝas tutmonde la sociordo socialista. Tiu ĉi sistemo, entenanta pli multe ol trionon de la homaro — kaj ĝia ĉefa forto la Sovetunio —, uzas sian ĉiam kreskantan ekonomian kaj scienc-teknikan potencialon por neniigi imperiistan agadon kaj antaŭhaltigi aktivecon de aventuremaj militistoj.

Internacia laborula movado alte ten-flagrigas la porpacbatalan flagon, vigligas singardemon de nacioj, inspiras tutmonde ĉiun noblan homon al aktiva agado kontraŭ la agresiva politiko de imperiistoj.

Multmilionaj nacioj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko, kiuj luktakiris liberecon kaj politikan sendependecon, samkiel popoloj batalantaj pri nacia liberiĝo, fariĝas ĉiam pli aktivaj pacdependantoj kaj kompreneble aliancaj al la pacama politiko de socialistaj landoj.

Por la paco kaj paca kunezistado manifestas neutralaj ŝtatoj, kiuj ne konsentas kun agresiva politiko de imperiistoj.

Milionoj da homoj en ĉiuj landoj, kiuj hodiaŭ unuiĝis en tutmonda pacdefenda movado, strebas savi sian patrujon kontraŭ nova militincendio.

Ĉiuj-ĉi pacamaj fortoj al decidiga batalo senpere ligitaj, kapablas neniigi krimulajn militpianojn, konservi la pacon, kaj firmigi amikecon interpopolan.

La paco ne estas alvenanta aŭtomate. La pacon oni povas defendi kaj solidigi nur per komuna luktostreĉo de ĉiuj pacamaj fortoj.

NI KOMUNISTOJ ALVOKAS LABORULOJN KAJ NACIOJN EN ĈIUJ MONDPARTOJ:

Klopodu pri malstreĉigo de internacia tensio kaj pri packunekzistado, batalu kontraŭ „malvarma milito“, kontraŭ febra armado! Se la giganta kvanto da rimedoj elĵetata je armado utiliĝus por pacceloj, tio ebligus plibonigi la situacion de popolmasoj, malaltigi senlaborecon, altigi salajrojn kaj vivnivelon, evoluigi loĝejkonstruadon, plibonigi popol-asekurstestemon.

Ne allasu disetendiĝon de atomarmado kaj ekipadon de germana kaj japana militarismoj per armilaro por amaseniigado!

Postulu pac-kontraktigon kun ambaŭ german-ŝtatoj kaj ŝanĝon de okcidenta Berlino je senarmigita libera urbo!

Batalu kontraŭ strebado de imperiistaj registaroj, kiuj volas pluajn landojn treni en malvarman militon kaj militpreparojn!

Postulu ke likvidiĝu fremdaj militbazoj kaj retiriĝu fremdaj armeoj desur aliŝtataj teritorioj, samkiel la malpermeson fondi novajn militbazojn! Penadu landojn senigi de premtrudigaj agresaj militpaktoj! Postulu kontraktojn pri senatomaj zonoj!

Ne permesu strangoli liberon de heroo Kuba-popoio nek per ekonomia blokado nek per armitara interveno de usonaj monopoloj!

Ni komunistoj, batalante por interesoj de laborula klaso, por interesoj de nacioj, prezentas manon al social-demokratoj, al anoj de aliaj partioj kaj organizaĵoj, defendantaj la pacon, al ĉiuj membroj de sindikatoj, al ĉiuj patriotoj: Kune kun ni klopodu pri la paco, senarmigo. Ni sukcesu komune procedi!

Ni kreu komunan batalfronton kontraŭ preparoj de imperiistoj al nova milito!

Ni komune defendu demokratajn rajtojn kaj liberojn, ni luktadu kontraŭ obskuraj fortoj de la reakcio kaj faŝismo, kontraŭ rasismo, kaj ŝovinismo, kontraŭ hegemonio de monopoloj, kontraŭ milit-reĝimo en ekonomia kaj politika vivo!

La batalo de nacioj por libereco kaj sendependeco malfirmigas la fortojn de milito kaj multoblighas tiujn de la paco!

Al nova vivo vekighas Afriko, kies popoloj plej multe suferadis sub la jugo de kolonia servuteco kaj barbara ekspluatado. Afrikaj popoloj kreas siajn sendependajn ŝtatojn kaj enpaŝas historian arenon kiel juna, ĉiam pli nemstara pacama forto.

Sed la koloniismo, per historio al pereco kondamnita, ankoraŭ ne estas tute neniigita.

Brutalaj perforto kaj teroro al la popoloj de britaj kaj portugaliaj kolonioj en orienta Afriko malhelpas antaŭenmarŝi survoje al libero. En Sudafrika Unio furiozas reĝimo rasista. Jam ses jarojn la brava alĝeria popolo batalas pri la rajto je nacia sendependeco, sangadas en milito, kiun al ĝi enrudis la francaj koloniistoj subtenataj de siaj atlantikaj aliancanoj. En Kongo-lando imperiistoj evitas neniujn rimedojn, por helpe de trompaj ĵonglajoj kaj subaĉetado eksigi la legitiman registaron kaj ĝian potencon enmanigi al siaj obeemaj marionetoj.

Popoloj kiuj batal-akiris la rajton je memstara ŝtat-ekzistado, daŭrigas malfacilan lukton kontraŭ novaj formoj de koloniismo, kontraŭ usonaj kaj okcident-germanaj koloniistoj, kontraŭ malnovaj anglaj, francaj kaj aliaj subpremantoj, kiuj ĉiাপreze strebas en siaj manoj retenigi la naturriĉaĵon, minejojn kaj koloniplantejojn, bremsi la industri-evoluon de liberiĝintaj landoj, al ili enrudigi korupteblajn reakci-registarojn.

Fratoj en landoj, kiuj liberiĝis el koloniismo! En landoj, kiuj batalas por sia liberiĝo!

EKSONIS LASTA HORO DE KOLONIISMO!

Ni komunistoj estas kun vi! Kun vi estas la potenco tendaro de socialistaj ŝtatoj!

Kune kun vi ni postulas al ĉiuj popoloj tuj kaj senkondiĉe rekoni la rajton je sendependa ekzistado!

La riĉaĵo de viaj landoj kaj la fruktoj de laborulara strebado servu nur al prospero de viaj popoloj!

Via luktado pri plena suvereneco kaj ekonomia sendependeco, por via libereco, servas al sankta pacafero!

NI, REPRESENTANTOJ DE KOMUNISTAJ KAJ LABORULAJ PARTIOJ, TURNAS NIN KUN ALVOKO

al viroj, virinoj kaj junularo,
al homoj de ĉiuj profesioj kaj socitavoloj.
al ĉiuj homoj sen diferenco de politika konvinko kaj religia konfesio, sen diferenco de nacieco kaj haŭtkoloro,
al ĉiuj, kiuj amas la patrujon kaj malamas la militon.
Postulu tujan malpermeson de provoj, fabrikado kaj uzo de nuklear-armiloj kaj same de ceteraj armilspecoj por amasneniigado !
Postulu senprokrastan kontraktigon pri ĝenerala, tutplena kaj kontrolata senarmigo !
La samtempaj scienco kaj tekniko ne plu kontribuu al fabrikado de pereiga mortiga armilaro, ĝi servu bonfarton de la homaro kaj al homa progreso!
Anstataŭ milit-grupiĝoj triumfu la amika kunlaboro, ampleksa komerc- kaj kultur-elŝanĝo inter ĉiuj landoj!

En nia epoko

LA FORTOJ DE PACO SUPERAS TIUJN DE LA MILITO!

La nacioj atingos la noblam kaj sopiratan celon — defendsavos la pacon, se ili unuigos siajn fortojn kaj sisteme samkiel plenaktive batalos por la paco kaj internacia amikeco.

La komunistoj ĉiun sian energion dediĉos al ĉi tiu celo.

LA PACO VENKOS LA MILITON!

Esperantigis: Jana Cichova

TEMPO POR NOVA HISTORIO

„Por la homaro troviĝas en niaj tagoj neniu pli grava tasko ol la batalo kontraŭ la minacanta robot-kaj kernarmila milito, por ĝenerala kaj plena senarmigo, por la konservado de la paco.

En niaj tagoj troviĝas neniu pli nobla devo ol la par-toprenado en tiu batalo.”

Tiuj ĉi vortoj troviĝas en la apelo al la popoloj en la tuta mondo, kiu estas eldonita de la konferenco en Moskvo de la komunistaj partioj el la tuta mondo. Ĝi esprimas veron pri kiu ĉiam pli da homoj konsciiĝas.

La timo pri nova milito estas granda. La penso pri la teruregeco de atommilito ne estas forigebla. Kaj tiu timo devas fariĝi ĝermo por paclaboro. La vorto paclaboro estas granda sed ĝi havas sian adekvatecon en partoprenado en tiu batalo.“

La pacdefendantoj devas ĉiam agi kuraĝe por la postulo pri senarmiĝo, pri malpermeso de la kernarmiloj kaj pri internacia kunlaboro. Necesas konvinki laborkamaradojn kaj amikojn pri tio, ke ĉiu kontribuo al la paclaboro estas grava, ke ni kune povas malhelpi la eksplodon de nova milito.

Ni — tio estas la individuoj, la popoloj, la homaro, malamas la militon kaj volas vivi en paco. Nia forto povas venki ĉiun kontraŭstaron, se ni komprenas, ke ni devas agi kaj kunlabori unuece.

La apelo, la signalo, kium la komunistaj partioj tutmondaj prezentis al la homaro havas optimisman tonon. Ĝi ne nur estas bazita sur kredo sed ankaŭ sur la scienca sperto, ke la fortorilatoj en la mondo ŝanĝis favore al la fortoj de la paco.

Milito ne plu estas neevitebla, kiel ĝi ĝis nun estis dum la paso la mondhistorio. En nia epoko la fortoj de la paco superas tiujn de la milito. Tio aliformigas la tutan mondbildon.

Ivan Koĥ, Moskvo.

LA LETERO EL KRONIKO

La 12-an de aprilo 1961 suprenflugis en la kosmon la unua homo, soveta civitano J. A. Gagarin.

Komenciĝis la nova erao de homaro.

USSR en la sama tago, kiam ĝi al la tuta mondo ree pruvis sian superecon, denove proponis al ĉiuj ŝtatoj kunlaboron kaj pacon.

* * *

La 15-an de aprilo 1961 atakis anoj de kadukiĝinta kapitalismo la insulon Kubo por pereigi klopodon de ĝia popolo pri libereco, progreso kaj prosperado. Ĝis la 19-a de la sama monato la atakintoj estis frakasitaj.

* * *

La tuta mondo, unuavice ĉiuj pacbatalantoj, gratulas al venkintoj en paca laboro kaj en liberiga batalo.

Zamenhofa festo en Bratislava

En la amfiteatro ĉe la Universitato Komenský en Bratislava okazis (ĈSSR) solena Zamenhofa vespero. Ĝin partoprenis granda nombro de esperantistoj kaj ankaŭ adeptoj de la ideo de internacia interkompreniĝo el vicoj de neesperantistoj. Ĉi tiu belega solenaĵo fariĝis vere impona porpaca manifestacio kaj samtempe rememoriga dankesprima okazintaĵo omaĝe al la kreinto de lingvo internacia — Esperanto.

Festparolanto estis la nacia artisto fama ĉeĥoslovaka akademia pentristo MARTIN B E N K A. Li kritike pritaksis la vivon kaj laboron de d-ro Zamenhof kaj ankaŭ rekoneme rememorigis la meritojn de du slovakaj eksterordinare agemaj poresperantaj pioniroj, la jam mortinta d-ro Alberto Ŝ k a r v a n kaj la ĉiam juna senioro de slovakaj esperantistaro la muzik-komponisto kaj verkisto Johano Valastyan — D o l i n s k ý kiun sole la subita malsaniĝo malhelpis partopreni ĉi tiun agrablan kunvenon.

La ĉeestantojn salutis esperantlingve la bulgara kon-sulo en Bratislava k-do R u s i n o v , kaj polalingve en nomo de pola konsulo la direktoro de la pola kultur-centro en Bratislava. En la altnivela



kulturprogramo prezentiĝis la opera kantistino de la Slovaka. Nacia teatro dirino Tana Masarikova. Ŝi kantis esperantlingve arion de Najado el la samnoma opero de Dvořák, slovakan popolkanton, kaj Rozflorojn de Schneider—Tmavsky. Fortepiane ŝin akompanis la ĉefo de opero de Slovaka Nacia teatro profesoro Valach. Poste la 50 membra infana kantista ĥoro kantis slovakajn, japanajn kaj esperantlingvaj kantojn. La du etaj gefratoj Rosa ravige deklamis du poemetojn en traduko de sia paĉjo. La ĉeestantaron fine salutis la reprezentanto de Ĉeĥoslovaka esperantista komitato, la premiito de belartaj konkursoj de UEA en la jaro 1960 d-ro Ludoviko Izak.

Sube ni aperigas mallongan eltiraĵon el la festparo-lado de nacia artisto Martin Benka :

„La hodiaŭa memorgesero estas ne nur festa momento de la slovakaj esperantistoj, sed ankaŭ okazo por ni ĉiuj, kritike primediti la vivon kaj rezultojn de D-ro Zamenhof, precipe el vidpunkto de plenumado de la nuntempaj respondecaj taskoj.

Temas pri taskoj rilate al batalo por paca interkompreniĝo de la nacioj, por perfekta malarmado, definitiva likvido de kolonialismo kaj sekurigo de la paco, — por ĉiuj ĉi tiamaniere, kiel la koncernajn taskojn resumis kaj fiksas la deklaro de reprezentantoj de la komunistaj kaj laboristaj partioj, en Moskvo ĝuste kunvenintaj okaze de la 43-a datreveno de la granda oktobra revolucio.

Nenece akcenti, ke plenumante ĉi tiujn naciajn taskojn la lingvo kiel interkompreniĝilo en nacia kaj internacia vivo havas grave respondecan destinon.

La unuan lokon okupas kompreneble la lingvo gepatra. Je la dua apartenas la lingvo rusa, pere de kiu oni jam grandparte interkompreniĝas kaj kiun studas ne nur ĉiuj kleraj homoj de la socialismaj landoj, sed ankaŭ progresemuloj de la tuta mondo. La tria en la vico estas la internacia lingvo Esperanto, kiun D-ro Zamenhof disponigis al la homaro kun la deklaro: — Pri ĉio cetera klopodu la homa societo kaj vivo, samkiel ni tion vidas ĉe ĉiu el la vivantaj lingvoj. Ne mi, sed la homa talento, logiko kaj leĝoj, kreitaj de plimulto de la esperantaj verkistoj kaj lingvouzantoj estu plue respondecaj pri la sorto de Esperanto. Ĉi tiu internacia lingvo vivu, kresku kaj progresu laŭ la samaj leĝoj, kiuj regulas ĉiujn naciajn lingvojn.

La 73 jara ekzisto de Esperanto plene konfirmas la ĝusteecon de lia decido, transdoni la zorgadon pri la internacia lingvo en la manon de la popolo mem. Per tiu decido D-ro Zamenhof klare esprimis, ke la respondeco pri la lingvo apartenas al ĉiuj honestaj homoj de l' mondo, kiuj ne permesas misuzi Esperanton por celoj malsamaj, ol fiksita en ĝia destinitateco. La homaro povas esti juste fiera pri tio, ke Esperanto sukcese plenumadas sian edifan mision.

Kiel oni devas nune rigardi la vivon kaj verkon de D-ro Zamenhof? Mi pensas, ke estas ĝustaloke citi la notojn de D-ro Jaromir Jermář, la prezidanto de la Ĉeĥoslovaka Esperantista Komitato, publikigitajn en ĝia decembra bulteno.

„La vojo de D-ro L. Zamenhof estas komplika linio de timema juda intelektulo, sufokita per rasa kaj ekonomia premoj, kiu ne sciis alligi sian klopodon al sole reala forto, la laborista movado, kiu estus povinta solvi ĉiun antagonismon. Li kiel kuracisto de la plej malriĉaj tavoloj dum tuta sia vivo apenaŭ kapablis perlabori eĉ la minimumon de ekzistado por sia familio. Malgraŭ tio li ne fariĝis revoluciulo, sed ĝismorte persistis en pozicioj de liberala humanismo. Zamenhof opiniis, ke la ĉefa kontrasto en la moderna socio estas la diferenco de la lingvoj kaj religioj. Tial lia vivoverko estis ia kvazaŭ malfruiĝinta resono de la humanismaj konceptoj de 17^a (17) -a jarcento kaj unuavide havas multon komunan ekzemple kun nia Johano Amos Komenský, kiu estas prapatro de 1^a ideo pri internacia lingvo, eĉ unu el ĝiaj unuaj aŭtoroj.

Sed Zamenhof vivis inter aliaj historiaj kondiĉoj, en la tempo de evoluiĝinta kapitalismo kaj kreskanta nacionalismo de la burĝanaro. Tiam klasdiferencoj de la socio determinis ĉiujn ceterajn kontraŭdirojn. Tial ankaŭ la supozo de D-ro Zamenhof -ke neŭtrala artefarita lingvo estas la rimedo, povanta forigi la kontraŭecon inter nacioj — estis historia eraro, kiun li dum sia tuta vivo ne perceptis, kaj nur liaj adeptoj rekonis.

D-ro Zamenhof unuflanke ne kapablis de ĝusta flanko ekvidi la sociajn interrilatojn, sed aliflanke ne malhavis senton por tragiko de rasa batalo, nacia sendependeco kaj subpremado de nacioj. En unu el siaj leteroj en la jaro 1905 li skribis: „Neniu sentas la malfeliĉon de la homar-dispartigo tiom profunde, kiel ĝuste judo el geto.“

Malgraŭ siaj mondkonceptaj eraroj D-ro Zamenhof esprimis certajn eksterordinare gravajn tendencojn de sia epoko. La postulo de internacia lingvo ja ne estis tute utopia ideo. Sufiĉas nur mencii la decidon de la 2-a kongreso de 1-a Internaciano el jaro 1867, en kiu staras: „La kongreso opinias, ke internacia lingvo kaj reformo de ortografio estas ĝenerale utilaj kaj baldaŭ alhelpus la unuiĝon kaj interfratiĝon de la nacioj.“

D-ro Zamenhof en la jaro 1887 publikigis sian projekton pri internacia lingvo sub la pseŭdonimo „Doktoro Esperanto“, kiun nomon poste ricevis de la disĉiploj ankaŭ lia lingvopropono mem.

Esperanto tuj komence tre rapide disvastiĝis en rondoj, kiuj ne povis havigi sufiĉe da lingvoscio, t. e. inter la laboristaro kaj etburĝoj. Tio akcentite influis la profilon de la esperantista movado.

Ĉi tiu lingvo havas nun jam vastan originalan kaj tradukitan literaturon, kaj fakan, kaj beletran, kiu per sia amplekso eĉ superas tiun de pliaj malgrandaj nacioj. Same konsiderinda estas ĝia publikiga radiuso.“

Malgraŭ ĉi tiuj kaj ankoraŭ multaj aliaj favoraj rezultoj la problemo de artefarita lingvo kiel internacia interkomprenigilo plue vivas kaj estas objekto de studoj kaj elkatedraj diskutoj flanke de filologaj kaj lingvistaj teoriuloj. Nu, la vigla uzado la lingvo de multaj malsamaj nacioj kaj ĝia utiligebleco sur kampoj sociaj kaj sociologiaj praktike respondas je multaj abstraktaj problemoj de la scienco.

El politika vidpunkto la historio korektis erarojn kaj malĝustajn opiniojn, kiujn D-ro Zamenhof ja havis. Lia merito tamen estas nediskutebla, ĉar preze de supermezuraj personaj kaj materialaj oferoj, ofte laŭ vojoj apenaŭ ireblaj li provis atingi la celon, por ni ĉiuj komunan, ke la homoj unu apud la alia - ne konsiderante diferencojn lingvan, religian, rasan kaj socian sistemon - vivu en paco.

Ĉi tiun komunan celon servas ankaŭ la laboro kaj ĉiu penado de la slovakaj kaj ĉeĥaj geesperantistoj, kiuj jam delonge utiligas siajn lingvajn konojn en la servo de nia belega lando kaj ĝia popolo.

Estu permesate ĉifoje mencii almenaŭ du personojn kun precipaj meritoj tiurilate, ke niaj slovakaj esperantistoj kiel poetoj, verkistoj aŭ tradukantoj ne nur esceptokaze povas konkuri kun mondaj eminentuloj. Unu estas la bonmemora aŭtoro de la unua slovaklingva esperanto-gramatiko, D-ro Alberto Ŝkarvan, la dua nia veterano kaj meritplena pioniro de la internacia lingvo en Slovakujo, la muzik-komponisto kaj verkisto Johano Valaŝtyan-Dolinský, al kiu ankaŭ mi dankas Esperanton, kiu krom mia profesia pentrado estas neelĉerpebla fonto de mia vivoĝojo, forto kaj krea optimismo.

La internacia lingvo Esperanto kaj ĝia praktika eluzo nuntempe ĝuas en nia socialisma lando favoron kaj helpon de la ĉeĥoslovaka komunista partio kaj de la registaro. Tion dokumentas ankaŭ la Statuto de la Ĉeĥoslovaka Esperantista Komitato, kiu donis ĉe ni al la esperantista ideologio firman kaj fidindan bazon.

Estas dezirinde, ke la kono de Esperanto fariĝu propraĵo en kiel eble plej vastaj tavoloj de laboruloj, ke helpe de ĝi per radiofonio, filmo kaj preso estu pli intense ol ĝis nun propagataj trans la limoj nia ĝojplena nuno, belecoj de nia patrolando kaj la konstruaj sukcesoj de nia popolo.


Verkistoj, poetoj kaj entute ĉiuj niaj artistoj devus pli ofte eluzi la konojn de esperantistaro, kaj helpe de ilia lingvo atingi eĉ translimajn forumojn. Tio same validas por niaj scienculoj, teknikistoj, por ĉiuj, kiuj servi volas bonan aferon, por kiu batalis granda filo de 1^o homaro, viro, kies meritojn eĉ la elstara organo de la kultura mondo — UNESCO — ĝuste nun honorigis, la kreinto de la internacia lingvo Esperanto, D-ro Zamenhof.

Gnafalio

Radioaktivaj elementoj en paca laboro.

Unu el gravaj celoj de pacdefendantoj estas forigo de danĝero el misuzo de atoma energio. Bedaŭrinda afero estas, ke unu parto da homaro preferas uzi precipe mortigan parton de ĉi tia epoka invento, anstataŭ preferi ĝian utilecon por krea laboro kaj bonstato sur la tero. Laŭ la maniero, kiel oni preferas uzi atoman energion en unuopaj ŝtatoj, estas eble taksu sincerecon de ilia sintenado al la afero de ia paco. Vere pacemaj ŝtatoj postuladas forigon de atomarmiloj kaj uzadas atoman energion por atingi pli grandan sukceson en fabrikado de utilaj maŝinoj, en sanitara zorgo ktp.

En la Unua maŝinfabrika en Brno estas uzataj radioaktivaj elementoj kun ultrasono kaj aliaj ne destruktivaj metodoj pro la kontrolo de produktaĵoj en la entrepreno. Radioizotopoj servas al la sama celo kiel rentgena aparato kaj ebligas kontroli ankaŭ feron, dikan pli ol 100 milimetroj.



Nia foto montras, kiel la 6 tunojn peza turbinparto estas kontrolita per radioizotopo, kiu estas pneŭmatike kondukita. Sur la bildo estas s-ano A. Balaš, prezidanto de la uzina esperantista rondeto. Kiu interesas sin pri defektoskopio, tio estas kontrolo de materialoj per ne destruktivaj metodoj, petu detalan raporton ĉe la Esperanto-rondeto ROH IBB ZKG n. p., Olomoucká 7, Brno, ĈSSR.

1961 POR LA PACO

Okazis en Amsterdam pacmarŝo, kiu iĝis granda sukceso. Partoprenis dek grupoj kaj organizaĵoj. Estis tre ĝojige, ke neniu el ili eluzis la akcion por propra propagando. Per kelkaj simplaj devizoj la manifestaciantoj montris sian sopiron al la paco kaj la rifuzon de atommilito. Pli ol mil personoj marŝis sub la streĉtoloj „1961 por la Paco“, „Pli bone esti pacaktiva hodiaŭ ol radioaktiva morgaŭ“ k. a.

La manifestacio estis, eĉ sen muziko kaj kantado, inda simbolo de nia pacvolo. La promenado daŭris pli ol unu horon. Alveninte en la konstruaĵon por la kunveno, oni rimarkis, ke la salono estis tro malgranda. Devis esti luata dua salono, kie oni per soninstalaĵo povis aŭskulti la paroladojn de Prof. Dr. Y. de Graaf, protestanta pastro v. d. Veen kaj s-ino Tine Uylenberg.

La akcio estos daŭrigata.

J. L. Rütte

AL ATOMA FRENEZO NI DIRU: »NE!«

„La saman tagon, kiam usonaj ŝtatinstytucioj unuafoje publikigis la fotojn de atombomboj, ĝisfunde detruintaj Japanajn urbojn Hiroŝima kaj Nagasaki, usona aviadisto Klod R. Izerlij, partopreninta la mortflugon, fuĝis el psikiatrejo, kie li estis kuracata. La polico organizis lian energian serĉadon.“

(Ĵumalia informo)

„Li estis altkreska, bela junulo, simila a Tarzano,“ la policon informis kasisto de iu nutraĵa magazeno en urbo Dallas, Usono.

„Dekomence li kondukis tre korekte,“ daŭrigis la kasisto. „Post tiam li ĵetis sin al mi, elŝiris la pakaĵon kun dolaroj kaj forkuris. Mi rimarkis la numeron de lia aŭtomaŝino.“ Dum proksimaj tagoj la rabisto estis kaptita. Post kruela batalo oni forprenis de li grandkalibran pistolon. La rabisto evidentiĝis konata recidivulo, jam kvinfoje arestita pro banditismo kaj rabatakoj. Kaj ĉiujn kvin fojojn li estis liberigita, malgraŭ liaj propraj konfesoj kaj petoj pri kondamno.

Finfine oni kaŝis la krimulon en psikiatrejon. Tio okazis en la jaro 1959-a.

Kiu do estis la kuraĝega atencinto, al kiu minacis nek puno, nek malliberejo? Pri tio respondas usona gazetaristo: li estis majoro Izerlij, la komandinto de „fluganta fortikajo“, en la 1945-a jaro ĵetinta atombombon sur Japanujon. Post la milito la piloto revenis al sia hejma Teksaso. Lian bruston ornamis la plej alta distingo entute atingebla por la usona flugisto.

Teksaso akceptis lin tiel, kiel siatempe Romo akceptadis la imperiestrojn en iliaj triumfaj tagoj: donacoj, trumpetoj, stelumitaj flagoj en ĉiuj fenestroj ...

Sed la heroo de l'tago eĉ ne finaŭskultis la salutparolon de urbestro. Vespere oni trovis lin en iu fojnejo: kaŝinte sin en la fojno li laŭte ploris.

La edzino de Izerlij baldaŭ postulis la eksedziĝon. En la juĝejo ŝi rakontis:

— Mi ne plu povas kunvivi kun Klod. Mi amas lin kiel antaŭe, sed mi timas, terure timas. Nokte li ofte saltas de la dormo. Al li ŝajnas aŭdataj posttombaj voĉoj, vokantaj: „Ne mortigu, ne mortigu!“ kaj li mem komencas krii: „For, for — mi diras al vi! Ne! Ne! Ne tuj, pensu pri infanoj! Ili forbrulas vivaj!“ Ĉi momente estas terure Klodon alrigardi. Liajn trajtojn kripligas interna paniko kaj turmentoj. Li vekiĝas en la febro, petas ordigi lian vojokofron, ĉar li devas fuĝi, fuĝi, fuĝi... Ŝajnas al li, ke Pentagono denove volas sendi lin al Hiroŝima, por kolekti informojn pri la nombro de bruligitaj infanoj. Ekvidinte policanon li volas fuĝi kaj sin kaŝi. Li perdas la prudenton

La edziĝo estas disigita. Klod trafas en la frenezulejon, tamen fuĝas el ĝi por fariĝi gangstero. Li volas antingi, ke oni lin punu.

Estas interese noti, ke Klod Izerlij ne estas la sola, trafita de tiom terura sorto. Kolonelo de Britlanda aerfloto Leonard Ĉeŝajr, la sola brita partopreninto en la „atoma flugo“, kiu kontrolis la flugatakon, ankaŭ konfuziĝis spirite. Jen, kion pri li skribis angla historiisto Fernand Dĵajgon en sia libro „Apokalipso de atomo“:

„Ili estas super Nagasaki. Al Ĉeŝajr ŝajnas, ke ili troviĝas en infero. Sube furiozas fajra oceano. Ĉeŝajr rigidiĝas, ekvidinte la amplekson de okazinta. Lia menso malheliĝis. Ŝajnas al li kvazaŭ li aŭdus la helpkriojn de infanoj. La fininto de Oksforda universitato, militheroo, posedanta ion de Oskar Vaild kaj Milton, tremas pro ekscito kaj teruro. La terura fenomeno ne forlasos ĝin ĝis fino de l'vivo. Neniam li kapablos ĝin venki.“

Kolonelo Leonard Ĉeŝajr monaĥiĝis.

Sed kiom da tiaj ankoraŭ restas en Usono, Britujo kaj Germana Federacia Respubliko? Kiom da tiaj homoj mense kaj korpe estas torturataj sur la aerodromoj kaj dum eksperimentaj flugoj? Kiom da tiaj, tute ne kalkulante eventualajn estontajn viktimojn — en novaj Hiroŝimoj kaj Nagasakioj?

La mondo ne rajtas allasi atoman frenezon. La popoloj de l'mondo scias, ke nuklea termo-bombo estas almenaŭ milfoje pli efika, ol la ĵetitaj sur la Japanujon kaj mortigintaj pli ol 200.000 homojn en dekono de sekundo la 6-an kaj 9-an de aŭgusto 1945-a. Depost tiam la virinoj de Hirosima naskis 5000 nenormalajn, kripligitajn infanojn, dediĉitajn al neevitebla, malrapida morto.

E1 latva junulara gazeto „Padomju Jaunatne” (Soveta Junularo) Nr. 20 (4056) — 28. 1. 1961.

Eduards Dancis, Valmiera, Latv. SSR

LA ARKEO DE NOA KAJ ĤRUŜĈOV KAMARADO ĤRUŜĈOV EN AŬSTRIO

La vizito de kdo Ĥruŝĉov, la registarĉefo de Sovetunio, en Aŭstrio pruvis la fortan pacvolon de Sovetunio kaj la gravecon de la neŭtraleco de Aŭstrio. Pri la vizito la ĵurnaloj multe raportis. Sed ĉar multaj el ili, precipe en okcidentaj landoj ne konigas detale la parolojn de la soveta ministroprezidanto, mallonge ni sciigas ion el liaj paroladoj.

En la viena kortega palaco „Hofburg“ ĉe festkunsido de la Aŭstra—Soveta Societo li paroliis pri la paca kunvivo de la diversaj reĝimoj. „Ĉi tie oni ne povas prijuĝi, ĉu la kapitalista reĝimo aŭ la socialista reĝimo estas la pli bona. Sed tio estas certa, ke **oni devas vivi en paco**. Oni devas malhelpi la militon, kiu ja estus terurega. Ni devas vivi sur tiu ĉi terglobo.“

Pri tiu situacio rakontis kdo Ĥruŝĉov la legendon pri la arkeo de Noa. Li menciis, ke en la lernejo li estis ankoraŭ kredanto kaj eĉ ricevis laŭdon de la pastro, ĉar li bone lernis la Bibliion. Laŭ tiu libro, kiam la diluvo atakis la teron, tiam Noa akceptis en la arkeon **sep parojn da puraj kaj sep parojn da malpuraj estaĵoj**. Tio signifas, ke li volis savi ankaŭ el tiuj estaĵoj. kiujn cetere tiutempe oni malŝatis. Sed en la arkeo devis kaj la puraj, kaj la malpuraj estaĵoj konduki tre trankvile. Se ili estus luktantaj unu kontraŭ la alia, la arkeo estus subakviĝinta.

Tiu ĉi apologo montras al ni, **kiel pace devas vivi en la nuna epoko la homoj unu kun la aliaj, ĉar la vivo sur la tero estas iom tia nun, kiel estis en la arkeo de Noa**: unu granda kunfrapiĝo kaŭzus la subakviĝon de la tuta arkeo. Ja la mondo fariĝis terure malgranda, depost la raketoj fulmrapide ĉirkaŭflugas la teron. Ĉu ni ne povus tiel vivi, kiel la estaĵoj akceptitaj en la arkeo do Noa? Tion oni devas pripensi! La komunistoj deziras solvi la konfliktojn pace. Ili volas konstrui reĝimon, kiun ili opinias la plej bona. Sed ne per militoj, sed per paca konkurso.

Ni menciuj ankoraŭ el lia gravega parolado jenon: Sovetunio deziras malarmadon ligite kun kontrolado. Sed kontraŭas la kontroladon sen neniigo de la armiloj. Li diris ekzemplon akceptitan tre serene: Se iu renkontas dum malhela nokto en arbaro fremdulon, tio certe ne estas agrabla. Kaj se nun unu demandas de la alia, ĉu li havas armilon kaj la alia respondas, ke jes kaj montras sian pistolon kaj poste remetas ĝin en sian poŝon. Kia atmosfero, kia animstato estos inter ili post tio? Ĉu ili eble estos trankvilaj? Certe ne! Kvankam, jen ili reciproke informis unu la alian. Ili konstatis, ke ĉe ambaŭ estas pistolo en la poŝo kaj ili eĉ pli timus unu de la alia, ke iu neatendite elprenos sian pistolon kaj ekpafos.

Tial estas sensece fari kontroladon sen neniigo de la armiloj, ĉar ambaŭ flankoj povas timi, ke la alia en konvena momento atakos lin. La popoloj volas ne kontroladon, sed la neniigon de la armiloj, la pacon, la forigon de ebleco de la milito. Se laŭ la dirita ekzemplo en la malhela arbaro la du homoj samtempe ĵetos siajn pistolojn en la Danubon, ili tuj pli sekure, pli trankvile sentos sin. Do **oni devas ĉiujn armilojn ĵeti en la maron** kaj poste kontroli, ĉu ne restis ie armilo kaj ĉu iu ne armas sin denove?

Se iu el la legantoj de PACO ne konsentas pri la deklaroj, bonvolu senhezite skribi sian opinion al la redaktejo.


P. B., Hungario

TEKNIKO SUR LA BONA VOJO

Iam kaj tiam ni aŭdadas plendojn, ke teknika progreso kaŭzas malkvieton, incitas nervan sistemon de homoj, donas eblecon al militistoj prepari militojn ĉiam pli kruelajn.

Oni pravas, se temas pri la tekniko, per kiu homo estas ekspluata, per kiu estas fabrikataj armiloj. Sed vizitu ekzemple la Internacian Foiiron en Brno (Ĉeĥoslovakio), kaj tuj vi akceptos pli favoran opinion pri la teknika progreso.

Nunjare en la tempo de la 10-a ĝis 24-a de septembro okazos jam la III-a ĉi tia internacia foiro. Simile kiel la foiroj antaŭaj, ĝi temos precipe pri fabrikoj maŝinaj kaj metalurgiaj. La vizitanto havos eblecon per ekkono, taksado kaj komparado mem prijuĝi atingitajn rezultojn de konkurado en paca, krea laboro. Ne kanonoj, tankoj kaj ceteraj pereigaj fabrikoj de militpreparantaj monopolistoj, sed maŝinoj, kiuj helpas krei kondiĉojn por feliĉa vivo — tio estas bona vojo de tekniko. Kompreneble, estos ekspoziciataj fabrikoj ne nur el landoj socialismaj, sed ankaŭ bonaj fabrikoj el landoj kapitalismaj pruvos, ke ĉie en la mondo paca laboro estas ebla kaj dezirinda.



Eksterlandaj esperantistoj povas ricevi specialan invitilon en nia komuna lingvo de la Foira oficejo en Brno (ĈSSR), Výstaviště 1, kaj pere de la Esperantista klubo en Brno (ĈSSR), Roosewelta 13, ili povas peti pluajn informojn pri vizito de la Foiro. La vizito signifas ne nur kontentigon de fakaj interesoj, sed la vojaĝo en Ĉefioslovakion, lando kun belegaj naturbelaĵoj, kulturaj kaj historiaj memorindaĵoj, estas granda, neforgesebla travivaĵo turisma.

LITERATURAJ FLOROJ

En la jaro 1925, mi kiel gimnaziano travivis la unuan fojon renkontiĝon kun la ĉina poezio, kiam venis en miajn manojn ĉeĥa traduko de antikvaj ĉinaj versoj fare de Bohumil M a t h e s i u s : „Nigra turo kaj verda kruĉo“. Tio estis por mi malkovro de mondo, plena de beleco, de profundaj ideoj kaj de pura, korproksima arto, kiu parolis al mi per lingvo komprenebla kaj kortuŝanta el trans abismoj de la malproksimoj kaj jarcentoj. Ekde tiu tempo mi kun granda ĝojo bonvenigadis ĉiun publikajon, kiu alproksimigis al ni la estimindan kulturon de la granda, long-ekzista popolo ĉina.

Poste la jaroj pasis. Sed kiom gravas la jaroj de la homa aĝo, kompare kun la miljaroj de la ĉina historio! Kaj tamen: De post la eldono de la unua tradukaĵo de Mathesius, kiom ŝanĝiĝis la vizaĝo de la Ekstrema Oriento! Fermemado kaj bolado de la vivo socia, politika kaj kultura; revolucio, milito, transpreno de la potenco fare de la laborista klaso; ekonomia antaŭensalto, kiu metamorfozas la fundamentojn de la socio ... Ĉio ĉi penetradis al ni kiel eĥo tra la filtro de ia gazetaraj sciigoj kaj politikaj informadoj.

Tiutempe proviĝis la utileco de la internacia lingvo, kiu helpas ankaŭ al malproksimaj nacioj, interkonatiĝi sen fremdaj perantoj. Ekde la jaro 1952 mi havis la okazon preskaŭ regule legadi la interesan kaj bone redaktatan esperantan gazeton „E1 Popola Ĉinio“. La bildo, kiun la ĉinaj amikoj en ĝi prezentadis al ni pri sia patrujo, vidigas tute alian mondon, ol kia estis al ni konata el la antaŭmilitaj publikaĵoj: Klara programo de la nova Ĉinio, la socialismo, estas realigata energie, kun firma fido kaj neŝanceligebla persistemo, ankaŭ por la prezo de senmezuraj oferoj. La malnovaj civitanaj virtoj: la sperto, lerteco, pacienco kaj diligento, kuniĝis kun la plej moderna tekniko. La celkonscia gvidado de la Komunista Partio de Ĉinio transformadas la surfacon de la tero kaj la pensmanieron de la popolo.

En la servojn de la nova ideo estas metita ankaŭ la tuta kultura aktiveco. La heredaĵo de la klasika pasinteco ricevas novajn valorojn. La malnova idealo de harmonia homo estas potencigita en idealon de nemarĉandema batalanto. La nova Ĉinio ne rezignas pri la malnovaj tradicioj, sed disvolvas ilin kaj plenigas ilin per nova spirito. Ĝi forlasas la katenojn de la mandarena formalismo kaj ĉerpas el la profundaĵo de la kreaĵ fortoj de l' popolo.

Per tiu ĉi nova spirito de la ĉina kulturo estas plenigita ankaŭ la literaturo de la lastaj jaroj, kiel ni povis ĝin ekkonadi jen el nacilingvaj tradukoj, jen el esperantaj tekstoj sur la paĝoj de la gazeto E1 Popola Ĉinio. Sed nun la Ĉina Esperanto-Ligo preparis agrablan surprizon: Post kolekto de noveloj, nomataj „Por nova afero, nova maniero“, ĝi nun eldonis reprezentigan verkon, kiu inde viciĝas al similaj publikaĵoj kolektitaj el alinaciaj lingvoj. Ĝi estas ĝis nun la plej granda esperanta libro aperinta en Ĉinio. Ĝia titolo estas Ĉ i n a A n t o l o g i o. La bibliografiaj datoj: formato 15x28 cm, 416 paĝoj, 11 nigra-blankaj kaj 3 koloraj ilustraĵoj sur kreta papero, duontole bindita; prezo 2 usonaj dolaroj.

La homoj nur malofte interesiĝas pri la statistiko. Tamen la antaŭparolo, kiun por tiu ĉi libro skribis Maŭ Dun, la prezidanto de la Ligo de Ĉinaj Verkistoj, estas legaĵo tre instrua. La Antologio estas elektita kiel specimeno de la literatura kreado nur de la lastaj dek jaroj; la periodo de la rapidega kreskado kaj ĝenerala antaŭenmarŝo. Kaj ni tie legas pri la kvanta alkresko de la literaturaj verkoj en tiu ĉi periodo: En la jaro 1950 aperis 156 novaj literaturaj verkoj, en la jaro 1958 jam 2600; la eldonkvanto estis en la jaro 1950 ĵe iom pli ol 2 milionoj, en la jaro 1958 jam pli ol 39 milionoj da ekzepleroj, la Ligo de la Ĉinaj Verkistoj havis en la jaro 1950 ĉirkaŭ 400 membrojn, lastjare jam pli ol 3100.

Maŭ Dun mencias ankaŭ la ĉefajn trajtojn, kiuj karakterizas la kvaliton de la nova ĉina literaturo: ĝi estas unue ĝia celo, servi al la popolo; plie la literaturo fariĝas ankaŭ objekto de aktiva intereso de la homamasoj, en la vicojn de la verkistoj eniris laboristoj, kamparanoj, soldatoj; fine videblas granda evoluo kaj ekflorado de la naciminoritataj kulturoj.

Ni vidas do, ke tiu grandega antaŭensalto, kiun spertis la Popola Ĉinio en la lastaj jaroj, ne restis limigita nur je la kampo ekonomia, sed ĝi manifestiĝis ankaŭ sur la kampo kultura.

La Ĉina Antologio, kiu nun estas en niaj manoj, estas laŭ promeso de la eldonintoj la unua volumo, kiun sekvos pliaj. Tiu ĉi volumo ampleksas specimenojn el la verkoj de 30 poetoj kaj novelistoj, nome 21 poemojn, 16 novelojn kaj 3 skizojn. Ĝi estas zorge redaktita kaj enhavas biografiajn datojn kaj komenton, kiu faciligas la komprenon de iom malproksimaj temoj. Ĉe la tradukado partoprenis la meritplenaj ĉinaj esperantistoj: S. J. Zee, Pandiŝo, Censinio, Yang Yong-sen, Laŭlum, I. Ko kaj Honfan. La lingvan kontrolon faris Ĉ. Ĉen kaj J. S. Zee.

La lingva nivelo estas tre bona kaj por ni, eŭropaj esperantistoj, instrua, se oni konsideras la diferencojn en la strukturo de la lingvo, el kiu la libro estas tradukita. Certe estas menciinde, ke la ĉinaj tradukantoj sekvas la postsignojn kaj la tradiciojn de la Zamenhofa lingvouzo, koncerne la kompleksajn verboformojn, pri kiuj oni lastatempe tiom diskutadis en la esperanta gazetaro.

En tiu ĉi mallonga artikolo ne estas eble trakti kaj taksati la unuopajn poemojn kaj novelojn de la Antologio. Mi volas halti almenaŭ ĉe kelkaj el ili:

La poezian parton enkondukas versoj de Maŭ Zedong pri la legenda Granda marŝo, en kiuj estas en poezie rafinita maniero aplikata la malnova ĉina stilo, kun aludoj, duondiroj kaj ideoj mallongigoj, per kio la poemo de Feng Ĝi pri la brulligno-kolektisto, kiu frostmortis en la arbaro kaj nun lia fantomo vagadas tra la regiono, instigante al revenĝo kontraŭ la kruela bienposedanto. Ofte trovebla temo estas la konscio pri la propra forto: „Kio tremigas la montrakojn sur la vasta teritorio? Ne uragano, ne torenta pluvo, sed la paŝoj de laboristoj." (Tian Gian: Laŭdkanto por la patrolando.)

Ĉiu poezio kaj prozo estas tendenca — jes ja! Ĉar ĉio estas subigita al unusola ideo: metamorfozo de la naturo kaj de la homa menso; edukado al kolektivisma pensmaniero kaj al la konscio pri la respondeco. Tiel en la rakonto de Ma Feng „Antaŭscio pri tri jaroj“ estas bone prilaborita la temo, kiel maljuna sagaculo estis edifita je devkonscia kooperativano; en la novelo de Li Gun „Ne tiun vojon!“ temas pri superado de egoismo kaj de avido je terposedado, aliloke ni vidas, kiel oni subpremas la sopiron je la persona prospero (Li Gun: „Maljunulo Meng Guang-taj“).

Laŭ artisma vidpunkto estas plej elstaraj kaj plej emociigaj la noveloj pri la partizanaj bataloj kontraŭ la Japanoj (Hiaŭ Ping: „La venĝofloro de Marto“, Vang Juan-gian: „Partia kotizo“, Gang Lin: „Neĝa Tago“), aŭ el la korea milito (Li Baj-ju: „Sur la ŝoseo kun leviĝanta polvo“). Pro la grandeco de la celo, por kiu oni batalas, la unuopuloj forgesas pri si mem kaj pri siaj familianoj: „Kiom mi gravas!“

La rapideco de la ekonomia impeto, kiu transpaŝis ĉiun atendadon, priskribas la noveloj „Unu jaro“ (Fej Li-ven) aŭ „Tipa ekzemplo“ (Li De-fu).

El la tempo de la loksido de 1' nomadaj Kazaĥoj kaj kolektivigado de la paŝtejoj estas ĉerpita la temo de la rakonto „Transloĝigo de Ĝapolak“, kiun skribis kazaĥa verkisto Kasilkan Kozibajev.

La novaj, socialiste pensantaj homoj, estas prezentataj en la noveloj „Nokta hejmeniro“ (Aj Vu), „Mia juna amiko“ (Du Peng-ĉeng) kaj „La maljuna ĉeflaboristo“ (Geng Ŝi). La junaj kaj maljunaj koroj brulas por konstruado de la patrujo.

Ni vidas ankaŭ la renaskiĝon de la vivo inter la naciminoritatoj, en l'a skizo „La printemp-heroldoj apud la Dian-lago“ (Jung Ŝuo), kie indiĝena knabino diras al la verkisto: „Ni estas kvazaŭ mortintoj, kiuj nun reviviĝas“).

Tiu ĉi impona, laŭenhave varia libro certe trovos multe da legantoj. En ĝi kuniĝas la ĉarmo de la ekzotiko kun noblaj idealoj kaj streĉa rakontado. Ni esperas, ke plenumiĝos la promeso de la eldonintoj kaj baldaŭ sek-vos pliaj volumoj de tiu ĉi meritplena verko.

Pumpr, ĈSSR.

KULTURAJ ELRIGARDOJ

Kenneth Green estas la nomo de amerika dramaŭtoro, kiu skribis teatraĵon por plenkreskuloj — ludita nur de infanoj (en la aĝo de 7—13 jaroj). Lia dramo, titolita „Behind the Wall“, temas pri la ribelo en la varsovia geto kontraŭ la nazi-soldatoj, vidita per la okuloj de kvin infanoj. Ĝi ricevis sian unuan premieron en Jan Hus-Theatre en New York.

Paul Robeson estas promociita al honora doktoro ĉe la universitato Humboldt en la demokrata sektoro de Berlino. Kiel motivo estas indikita liaj meritoj por la evoludado de la kanto kiel „Fortinstrumento de 1' Pa-co“.

Teknikistoj el Germana Demokrata Respubliko gvidas la konstruadon de la unua presejo en Konakri, la ĉefurbo de Gvineo. En februaro, ĉi-jare, aperos la unua ĉiutaga gazeto en Gvineo. La presejo ankaŭ eldonos fakliteraturon. La juna afrika ŝtato ege bezonas tian.

„**La rusa miraklo**“ estas la titolo je dokumentarfilmo de la DEFA-reĝisoro Andrew Thorndike pri la evoluo de Sovet-Unio de 1917 ĝis nun. La filmo estas 115 000 metrojn longa kaj la premiero okazos aŭtune 1961.

Svedaj publikaj bibliotekoj ricevis proksimume 4000 librojn kiel donacon de Germana Demokrata Respubliko. Kaj el Ĉeĥoslovakio 522 librojn, konsistantajn el beletristiko, teknikaj kaj konsultaj verkoj, destinitaj por universitatoj kaj altlernejoj.

Visus, Svedio

KORESPONDI DEZIRAS:

USSR. **Tudorovskij** Margarit, inĝeniero, RIGA, str. Kolas N-ro 9, app. 6, Latvia SSR dez. kor. pri 6. t., interŝanĝas il. gaz., pmk., Tre ŝatas muzikon.

VIETNAMIO. **Pli ol 300 lernantinoj** de 3 lernejoj (N-o 6,13 kaj 18) el la urbo Haiphongo volas korespondi pri ĉiuj temoj kaj interesiĝas pri pm., fotoj, ill. pk., insignoj. Adreso: **Huy Minh**, Quoc' Doanh Phat-hanh sach, HAIPHONG, Vietnamio.

ĈEĤOSLOVAKIO. Vratislav **Kučera**, PLZEŇ, poŝtkesto 61, dez kor. kaj interŝanĝi pm., esperantistajn glumarkojn ktp. kun k-doj el Azio, Afriko, Ameriko kaj Australio.

F-ino Marie **Mrázová**, 23-jara muzikinstruistino, PLZEŇ, Rooseveltova 7, ĈSSR, dez. kor., interŝ. gramofondiskojn kaj muziknotojn.

D-ro **Oldřich Bryčka**, PLZEŇ IX, Křimická 22, ĈSSR, serĉas amikan korespondadon.

Jaroslav **Langmaier**, 29-jara instruisto, STRĪBRO, Palackého 808, ĈSSR, dez. kor. pri fotografado k. interŝ. fotojn.

Viktor **Matoušek**, PLZEŇ, Úslavská 5, ĈSSR, dez. kor. pri ĉ. t.

Vera **Radová**, oficistino, PLZEŇ, Mánesova 91, ĈSSR, dez. kor. pri ĉ. t.

Miluše Polívková, 18-jara flegistino, DOBŘANY, Stalinova 672, ĈSSR, dez. kor. kun fraŭloj k. interŝ. fotojn.

9 gesamideanoj dez. kor. kun ges-anoj el la tuta mondo. Skribu al Vaclav Babůrek DYMOKURY 119 u Mělníka, Ĉeĥoslovakio.

MEM – SEKRETORIEJO

Prezidento: Canko Murgin, str. Iskar 46, Sofia, Bulgario.

Ĉefsekretario: A. **Balague**, Traiseng. 26, **St. Pölten**, Aŭstrio.

Centra redaktoro: G. **Holmkvist**, Rönneholmsvägen 55, tr. 2. IV, Malmö V, Svedio.

PACO aperas ĉiumonate en malsamaj landoj. Tiu ĉi numero estas eldonata de la MEM-sekcio ĉe Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato (Osvětový ústav, Praha 2, Blanická 4).

Redaktoro: Jos. Ed. **Ambrož**, Brno-Židenice, Špačkova 3. Redakta komitato: D-ro Gorazd **Hofer**, Vratislav **Kučera**, Viera **Malárová**, Lingva konsultanto: Jiri **Kořínek**.

Administracio: Esperantista rondo de Závodní klub ROH Závodů V. I. Lenina, Plzeň, Kopeckého sady 13.

Jarkotizo: 20 Kčs — Presis: **Ocidentbohema presejo, nacia entrepreno en PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio.**

